Bavara Esperanto-Ligo (BELO)

Sinjorino Kerstin Ringler
Europäische Kommission
Generaldirektion Bildung und Kultur
Rue de la Loi 200, Büro B-7
BE-1049 Brüssel
Belgio-Belgien

BELO-Oficejo
Gosbert Gehlert
Am Kehlgraben 61
DE-96317 Kronach
Germanio

2001-10-18

Eŭropa Jaro de la lingvoj;
Internacia lingvo Esperanto

Tre estimata sinjorino Ringler,

la simpla civitano ne scias la kompetentecojn en la granda aparato administra de la Eŭropa Komunumo. Tiel mi skribas al vi, legante ke vi okupas altrangan postenon en la ĝenerala direkcio por edukiteco kaj kulturo.

La lernado de lingvo certe estas demando de la edukiteco kaj mi pensas, ke mi havas la ĝustan adreson por mia afero.

La lingvodemando en Eŭropo ne estas solvita. Kaj solvon, akceptite de ĉiuj membroj en la pligrandiĝanta komunumo, oni certe ne baldaŭ trovos. Sed la „eŭropa domo" ne havas grandan valoron, se la homoj, loĝante en ĝi, ne povas paroli unu kun la alia. Interkompreniĝo estas kondiĉo por komprenoj! Nun la politikistoj ĉiam postulas, ke la gejunuloj devas lerni kelkajn lingvojn. Tiu postulo estas malrealista, se oni konsideras ĝin senpasie kaj senantaŭjuĝe. Mi nun ne volas fari multvortajn klarigojn al tiu temo. Sed realeco estas, ke la plimulto en Eŭropo ne majstras kelkajn lingvojn. Kaj kiom da deputitoj en la Eŭropa Parlamento scipovas plurajn lingvojn?

La solvo de la problemo estas la neŭtrala, internacia lingvo Esperanto. Pri ĝiaj avantaĝoj eblus skribi multajn paĝojn, kion mi nun ne faras. Permesu nur kelkajn vortojn. Esperanto estas facile lernebla lingvo, kiu jam pruvis ĝian taŭgecon sur multaj kampoj (literaturo, scienco, tekniko, kulturo ktp.). Ĝi ankaŭ havas kulturon (ĉiam oni asertas la malon). Tiu lingvo ne intencas flankenŝovi la naciajn lingvojn, kiel ofte diriite. Estas stultaĵo. Sed Esperanto estas la plej taŭga interkompreniilo. Kaj la homoj, speciale la gejunuloj, lernus ĝin, se la respondecaj politikistoj por instruaj aferoj farus favoran decidon por tiu lingvo. Sed kion ili faras? Ili konsideras Esperanton sensencaĵo, ofte ne konante detale tiun lingvon.

Ankaŭ en la Eŭropa Parlamento sidas deputitoj, kiuj opinias, ke Esperanto povus iel helpi por pli facile kaj pli rapide igi la necesan dialogon en la Eŭropa Unio. Pruvo estas la fakto, ke sinjorino Cecilia Malmström demandis, ĉu la Komisiono povus precizigi la kialon pro kiu la eŭropa jaro de la lingvoj ne aplikiĝis al Esperanto (skriba interpelacio E-2631/01, 2001-09-17). Laŭ listo de la 6-a de decembro 1999 (Eŭropa Unio, Steenbakkerstraat 21, BE-8400 Ostende) subtenas 14,21 % EP-anoj Esperanton (89 el 626).

Nur ankoraŭ kelkajn faktojn.

- UNESCO agnoskis Esperanton kiel lingvo (ĝenerala asembleo 1954 en Montevideo; rezolucio IV.1.4.422-4224).

- La Vatikano aprobis la tekstojn por la celebrado de la sankta meso en Esperanto.
- Papo Johano la dua uzas Esperanton en siaj saluto] okaze de la festoj Kristnasko kaj Pasko.
- En ĉiu jaro okazas Esperanto-mondkongreso.
- En Hungarlo per leĝo en la lasta jaro ankaŭ Esperanto estas oficiala lingvo en lingvoekzamenoj.

Tiun liston mi povus daŭrigi, sed sufiĉas.

Do, mia demando estas, kial la kompetenta Komisiono de la Eŭropa Unio ne subtenas tiun internacian lingvon kaj ne stimulas aŭ akcelas la lernadon kaj la disvastigadon de ĝi, eĉ ne komence?

Mi tre ĝojus, se mi ricevus respondon de vi kaj antaŭdankas!

Sincere salutas

Gehlert
prezidanto

19-OKT-01 19:24 GOSBERT GEHLERT +49+0+9261+40376 SEITE: 3